

STARTO

N-ro 2/2022 (283)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Marcipana Pasko en Svitavy

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 603 264 003, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlá, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencoj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 515 906 099

miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

IFEF-kongreso en Beroun

Post longa pandemia paŭzo denove okazis en Ĉeĥio internacia esperantista renkontiĝo. De la 5-a ĝis la 12-a de majo 2022 kunvenis en Beroun 110 esperantistoj-fervojoj por ĉeesti IFEF-kongreson. Ili venis el Aŭstrio, Belgio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Koreio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovakio kaj kompreneble preskaŭ duono el Ĉeĥio. Kiel kongresejo, tranoktejo kaj manĝejo servis Grandhotel Litava.



Foto Jana Havlová

Esperantistoj havis je dispono propran akceptejon, kie oni ne nur disdonis la kongresajn materialojn kaj informojn, sed troviĝis tie ankaŭ riĉa libroservo sur ronda tablo. Tiu ĉambro, nomata **Ruĝa saloneto**, estis dediĉita al Per Engen (1924-2014), norvega fervojisto, honora prezidanto de IFEF. **Verda saloneto**, kie okazis negrandaj kunvenoj, al Jaromír Babička (1908-2002), honora membro de IFEF, kaj **Granda salono** al Joachim Gießner (1913-2003), honora prezidanto de IFEF.

Vendrede alvenadis la kongresanoj. Antaŭ la vespermanĝo la prezidanto de la Ĉeĥa Landa Asocio FISAIC Vladislav Vokoun invitis ĉiujn al la vestiblo por solena tosto, kiu poste fariĝis interkona

vespero kun neformalaj interparoloj.

La vera malfermo okazis sabate matene je la 9-a horo en la Granda salono Gießner. Ĉe la honor-estrara tablo sidis reprezentantoj de FISAIC, magistrato, Ĉeĥaj Fervojoj, ĈEA, IFEF, Administracio de Ĉeĥaj Fervojoj. Nian asocion reprezentis Libuše Hýblová sidanta apud Rodica Todor, prezidantino de IFEF. La kunsidon gvidis Jaroslav Matuška. Unue li invitis infanojn de loka muziklernejo de V. Talich, kiuj prezentis kelkajn komponaĵojn por trumpetoj, gitaro kaj dancojn. Sekvis salutoj de la menciitaj reprezentantoj, kiuj fine ricevis donaceton (kristalan modelon de lokomotivoj). Post paŭzo kantis Pavla Dvořáková kaj reprezentantoj de landaj sekcioj prezentis siajn salutojn, ankaŭ nome de UEA kaj ILEI. Kulmino estis disdono de diplomoj al meritplenaj IFEF-anoj kaj Honora Membreco al Anna Abelovská. La kunvenon finis la himno Espero. Poste ĉiuj kolektiĝis por komuna fotado sur la ŝtuparejo antaŭ la enirejo al la hotelo.



Rodica Todor transdonas al Anna Abelovská Honoran Membrecon de IFEF

La kongreso havis riĉan programon prelegan (kiun ekz. la malsana Ladislav Kovář partoprenis virtuale kiel preleganto), ekskursan kaj precipe muzikan. Okazis ankaŭ E-kurso kaj belgaj esperantistoj prelegis pri estonta IFEF-kongreso 2023 en Antverpeno.



Sabate vespere koncertis la grupo **NOPROBLEM** el Kostelec na Hané kantante en Esperanto kaj grupo de tridekjaraj junuloj **Black Buřínos** el Týniště nad Orlicí, kiuj ĉefe trumpetis kaj dancetis en diksilanda stilo. Dimanĉan bankedon vivigis fervojista muzikgrupo **JEDETO** (kun simila stilo kiel pli fama Šlapeto), tombolo, granda torto kun emblemo de IFEF (ĉiuj kongresanoj ricevis pecon da torto) kaj tre apetitveka bufedo. Lunde la interesatoj povis iri al la preĝejo de Sankta Jakobo por orgena koncerto. Marde la Nacia Vespere proponis unue infanan ensemblon **Notičky**. La grupo **Baráčníci** ne kantis, sed montris diversajn popolajn kostumojn bohemiajn, moraviajn kaj slovakajn. La vesperon fermis vilaĝa muzikbando **Třehusk** el regiono de la rivero Berounka.



Muziklernejo, Noproblem, Buřinos, Jedeto, Notičky, Baráčníci, Třehusk

Dimanĉa ekskurso estis gvidata de Petr Chrdle tra historia kerno de la urbo. Poste parto daŭrigis individue al la Potfarista Foiro sur la placo de Hus, kie oni povis admiri, eventuale aĉeti belajn potojn, pladojn kaj similajn varojn, sed pli grandan parton gvidis Chrdle al la Urba Monto kun ursejo kaj rigardoturo.

En la jaro 2000 naskiĝis tri ursidoj, fratoj, pri kiuj oni tiam filmis serion da filmetoj por infanoj, kiujn elsendis Ĉeĥa Televido antaŭ vespero. Kiam ili kreskis, ili estis donacitaj al la urbo Beroun, kiu havas urson en sia blazono. Unu el la fratoj mortis en 2016, sed Kuba kaj Matěj vivas ĝis nun, admirataj de turistoj en la ursejo (Medvědírium), sufiĉe granda ĝardeno sur la deklivo sub la rigardoturo.



Mardo estis dediĉita al tuttaga ekskurso al Křivoklát kaj fervojista muzeo en Lužná. En Křivoklát ĝuste filmistoj filmis iun reklamon en mezepokaj

historiaj kostumoj, la kongresanoj devis zorgi, ke ili ne estu videblaj en la filmo. La ĉiĉeronadon prizorgis Pavla Dvořáková, kiu preparis tekston pri ĉiu ĉambro aŭ ejo kaj esperantlingve ĝin klarigis. Unue la korton, poste malliberejon kun torturejo, kie estis longe enkarcerigita evangelia episkopo Jan Augusta, bibliotekon kun 50 mil volumoj kaj multaj pentraĵoj, tronsalonon, kie krom la trono estas ekspoziciitaj mezepokaj manskribitaj libroj. En la restoracio de Křivoklát la ekskursantoj tagmanĝis. En Lužná ĉiĉeronis inĝ. Kaplan (interpretis Malovec), kiu montris salonvagonon de prezidento Masaryk kaj ĉirkaŭ dudek lokomotivojn, kiujn li interese priskribis.

Merkrede 13 delegitoj el Belgio, Danlando, Francio, Kroatio, Italio, Germanio kaj Rumanio sub gvidado de Jaroslav Matuška partoprenis fakan ekskurson al centra kontrolejo de trajn-traffic regado (CDP) en Prago. Ili konatiĝis kun preparata disvastigo de teleregataj linisekcioj kaj vizitis la regajn salonojn mem por ĉeesti rektan teleregadon en unu el plej modernaj sekurec-instalaĵoj.

La ceteraj kongresanoj merkrede antaŭtagmeze ekskursis al proksima vilaĝo Nižbor, kie ili trarigardis vitrofarejon Rückl. La ĉiĉeronino (denove interpretis Malovec) klarigis, ke la vitron oni faras el kemiaĵoj (40%) kaj vitraj rompitaĵoj (60%). Ĉiuj forfalaĵoj aŭ fuŝaĵoj iras reen en fandujon, do 100%-a utiligo de materialo. En la laborejoj ni vidis blovadon de novaj vazoj, ilian metadon en malvarmigan fornon, en la krevejo flameto fortranĉas superfluan materialon, ĝi krevas kaj forfalas. En facetejo la facetistoj facetas ornamojn kaj fine gravuras bildetojn.

La familio Rückel venis el Svislando antaŭ 300 jaroj kaj fondis plurajn vitrofarejojn en Ĉeĥio. Tiun ĉi, fonditan en 1903, la ŝtato konfiskis en 1946, sed en 1992 pranepo de la fondinto ĝin reaĉetis. Cikonio estas sur ilia emblemo kiel simbolo de renaskiĝo (cikonio alportas bebojn), estas tie eĉ vivanta cikoniino Maruška, kiu pro vundiĝo ne kapablas flugi. Ili eksportis preskaŭ al la tuta mondo, sed la pandemio forprenis multajn klientojn.



Merkrede posttagmeze okazis la solena malfermo de la kongreso. Je la 16.30 h kolektiĝis la kongresanoj en granda salono por ferma ceremonio. Unue Ladislav Hakl tralegis leteron de Libuše Hýblová, prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiu devis antaŭtempe forveturi. Rodica Todor diris kelkajn

dankvortojn, poste estis invititaj LKK-anoj antaŭ la tablon por akcepti dankon per aplaŭdo. L. Hakl ĉiujn prezentis per la nomo. Tuj poste L. Hakl kaj J. Matuška transdonis la IFEF-flagon al belgaj reprezentantoj s-ro **Marc Cuffez** kaj s-ino **Kristin Tytgat**, kiuj post unu jaro organizos IFEF-kongreson en Antverpeno.



La kongreson preparis Loka Kongresa Komitato, kies prezidanto Ladislav Kovář malsaniĝis, sed la honora prezidanto Vladislav Vokoun ĉeestis. En LKK plue laboris Ladislav Hakl, prezidanto de ĈeFEA, Anna Abelovská, Jaroslav Matuška, Andrea Švubová, Marie Klumparová, Ondřej Šmehlík, Michael Šimková, Jan Kukla, Jindřich Tomíšek, Alois Klumpar, Vít Svanovský kaj Miroslav Malovec (kongresa bulteno), helpantoj Pavla Dvořáková, Petr Chrdle, Jan Kovář, Jaroslav Pokorný kaj Ivan Potíška.

Granda danko apartenas ankaŭ al s-ro Stanislav Veselý, ĉefkelnero, kiu kun sia teamo zorgis pri bona manĝo: matene sveda bufedo, tagmeze kaj vespere antaŭmanĝo, supo, ĉefa plado kaj deserto.

Prezidanto de LKK Ladislav Kovář ne povis partopreni kongreson pro sia malsaniĝo. Tamen li estis ĉiutage informita pri okazaĵoj dum la kongreso kaj salutis elkore ĉiujn!

Miroslav Malovec

Postkongreso

de la 73-a Internacia Fervojista Kongreso


Tuj post fino de la 73-a kongreso IFEF en Beroun okazis postkongreso de la 12-a ĝis 15-a de Majo 2022 en Pardubice. Decido elekti orientbohemia regionon kiel celon por postkongreso estis facila – organizantoj volis prezenti al ĉeestantoj tiun ĉi belan parton de Ĉeĥa respubliko.



Unua tago estis dediĉita al promeno en historia parto de Pardubice kun bela kastelo, kiun gvidis Ladislav Hakl. Dumvoje ni vizitis ankaŭ librejon kun ekspozicio pri J. A. Komenský, kie ni renkontis lokajn esperantistojn. Por partoprenantoj estis ankaŭ interesa malgranda ekspozicio de la plej malnovaj ĉeĥaj libroj.

Programo de la postkongreso daŭris vendrede la 13-an de Majo per vizito de urbo Litomyšl, kie ni plej frue vizitis faman kastelon kaj konatiĝis tie kun vivmaniero de iamaj posedantoj de la kastelo familio Waldstein-Wartenberg. Post mallonga promeno tra la urba placo ni translokiĝis al proksima urbo Svitavy, kie ni plej frue estis akceptitaj ĉe vicurbestrino s-ino D. Kukaňová. Ŝi

konatigis nin kun historio de la urbo kaj promeniĝis nin tra historia konstruaĵo de la urbodomo kiu estas nun nove rekonstruita. Sekvis vizito de Esperanta Muzeo en Ottendorfer-domo, kie ni renkontis membrojn de loka E-klubo. S-ino L. Dvořáková konatigis nin kun historio de la muzeo kaj agado de la loka klubo. Revenante al Pardubice ni faris mallongan paŭzon en „Roza herbejeto“, kie la partoprenantoj konatiĝis kun historio de la loko, kiu havas gravan rolon en ĉeĥa historio.



Dum plua tago ni vizitis plej frue bataklampon Chlum, kie okazis granda batalo inter Aŭstrio kaj Prusio en la jaro 1866. Ladislav Hakl detale konatigis nin kun evoluo de la batalo kaj interesajoj ligitaj kun ĝi.

Poste ni vizitis muzeon de sekuriga kaj komunikada tekniko en areo de firmao Signalmont en Hradec Králové. La gepartoprenantoj interesiĝis pri unikaj aparatoj, kiuj servis por certigo de sekureco dum fervojtrafiko. Je la fino de vojaĝo ni vizitis tendaron de J. A. Komenský en Běleč, vilaĝan subĉielan muzeon en Krňovice kun interesaj konstruaĵoj de kamparanaj domoj. Profundan impreson al partoprenantoj faris vizito de Probošt-betleheмо en Třebechovice.

Ĉiuj kunvojaĝantoj estis plenaj de impresoj kaj kontentaj kun programo de la postkongreso.

L. Kovář 22.5.2022

Marcipana Pasko

Sabate la 9-an de aprilo 2022 la Klubo de geamikoj de Esperanto en Svitavy aranĝis Marcipanan Paskon. Ĝi aliĝis al aranĝo de Urba Muzeo kaj Galerio, kiu organizis metiejojn por infanoj. Dum Pasko ni organizis tiun aranĝon la unuan fojon kaj kvankam ekstere pluvis, eĉ neĝis, ĝi sukcesis. Modeladon el marcipano kiel ĉiam gvidis Aniĉka Vyšínková. Sume modelis ĉirkaŭ 70 infanoj, kiuj forportis hejmen ne nur siajn modelojn, sed ankaŭ Memordiplomojn kaj etajn donacetojn. Krom infanoj el Svitavy, venis ankaŭ infanoj el Dubajo, Ukrainio kaj Venezuelo.



Jam nun ni planas tradician Marcipanan Kristnaskon dum la 2-a adventa dimanĉo kaj produktadon de leteroj kun Kristnaskaj deziroj kaj gratuloj jam en la 1-a adventa dimanĉo.

Libuše Dvořáková

Ili meritas rememoron...

Ke la urbo SVITAVY estas nia „patreca“ rezidejo, scias certe ĉiuj en nia lando, supozeble ankaŭ multaj en la Esperanto-mondo. Ĉiu okazaĵo pri ĝi, ĉu pasinta, ĉu nuntempa, estu inda por publikigo ankaŭ en niaj Esperanto-komunikiloj.

Ni rememorigu, ke la urbo enhavas unikajon – **la muzeo-ekspozicion pri Oskar Schindler...**

Kial oni supozu, ke la Mondo konas la nomon? Ĉar ekzistas fama kaj vaste konata filmo (de usona-grandbritia deveno) pri tiu ĉi personeco.

En ĉeĥaj tag-gazetoj ĵus anonciĝas, ke je la 12-a de aprilo (2022): *en la aĝo 107 jaroj en Israelo mortis Mimi Reinhard. Kiel la sekretariino de Oskar Schindler ŝi havis taskon fari liston de 1200 judaj laboristoj, kiujn O. Sch. laborigis en siaj fabrikoj (En municio-produktejoj! Kia paradokso!), en la pola urbo Krakovo kaj en Brněnec (en Svitavy-regiono), kaj tiel ilin savis kontraŭ la germana naziisma neniigo.*

Inter ili estis ankaŭ Mimi Reinhard, kiu en siaj rememoroj skribas pri O. Sch., ke „li estis ĉarmeca, tre sociema viro. Li ne konsideris nin „subhomoj“ (la fotografiaj dokumentoj, kiuj troviĝas en la Muzeo, tion pravigas; la ĝuo vidi tiun ĉi „dandy-on“), asertas Mimi R., kiu restis en la oficejo ĝis la fino de milito („kvankam mi havis kun O. Sch. nur minimuman personan kontakton“, ŝi aldonas).

Rim: Mimi Reinhard naskiĝis en Vieno en 1915 (Kiel Carmen Koppel), antaŭ la milito ŝi translokiĝis en Krakovo-n. Post la okupacio de Pollando ŝi vivis en juda geto, en 1942 ŝi estis transportita en la koncentrejon Krakow-Platzów. Ĉar ŝi estis kapabla (regis stenografion), ŝi estis okupita en la oficejo en Brněnec, kiel jam menciite supre.

*Modife esperantigis
Margit Turková,
aprilo 2022*

Vojaĝo al Esperanto-kaŝtano

Sabate la 23-an de aprilo 2022 esperantistoj el Svitavy entreprenis semajnfinan ekskurson, ĉe kiu ne mankis esperantistaj temoj. Nia unua halto estis inter Olbramovice kaj Votice en „Cikonia nesto“. Kiam ni vidis, ke el ruino de malnova bieneto elkreskis nova ekologia farmo, ne eblis la laboron ne laŭdi. Ĝi estas loko por promeno ne nur kun infanoj. En Votice ni intencis viziti Motýlárium (muzeo de papilioj), sed ĝi estis fermita. Tial ni daŭrigis nian vojon al Ratměřice al privata kastelo, en kies ĝardeno kreskas 60 specioj de foliaj kaj 30 specioj de pinglaj arboj kaj arbustoj. Inter ili du sekvojadendroj altaj 40 m kaj aĝantaj 180 jarojn. La tagon ni finis en Vlašim kun belega kastela parko.



La sekvan tagon ni trarigardis urbojn Humpolec kaj Lipnice nad Sázavou. En Lipnice atendis nin disreviĝo. Dum vizito de domo, kie vivis Jaroslav Hašek, mi vane serĉis la esperantlingvan version de Brava soldato Ŝvejk. Sinjorino sciigis min, ke la Esperanta versio de la romano estis eksponita en ekspozicio en la malsupra parto de la domo. Post vizito de muzeistoj la libroj estis transportitaj en la teretaĝon, sed la Esperanto-traduko malaperis. Ni ne forgesis la Esperanto-arbon, kaŝtanon, kiu estis plantita en 2013. La lasta halto estis ĉe la monumento Kapo XXII, kies senvaligon ni partoprenis (27.4.2013). La Esperanta surskribo restis, sed kelkaj ŝtonoj estis difektitaj de vandaloj.

Libuše Dvořáková

Ovofritaĵo de EK Vítkovice

Ĉar la vetero estis malfavora, Suchánek-familio proponis protekton sub ilia tegmento. La humoron tio ne fuŝis, danko apertenas speciale al Irenjo, kiu nin regalis per frandaĵoj. Ni kantis Esperantan himnon, ĉar ni volas lerni ĉiujn tri strofojn. Ni disiris kun rideto kaj deziro „venontjare kun pli bona vetero kaj ĉiam kun bona humoro.“



Renkontiĝo en Šumperk

La 21-an de majo 2022 kolektiĝis antaŭ la stacidomo en Šumperk proksimume dudek esperantistoj. Unue ili iris al muzeo de sorĉistaj procesoj, kie ĉiĉeronis per aŭskultiloj la inkvizitoro Boblig (parolata de praga aktoro Dušan Sítek). Enkondukon parolis kaj kantis nepino de Kvido Janík.



Poste ĉiuj transiris al vinejo Ĉe Urseto, kie reprezentantoj de la kluboj parolis pri sia laboro kaj aŭskultis muzikon. Ĉion gvidis Kvido Janík per sia humuro. Klubaninoj preparis kukojn kaj kolbasetojn, trinkaĵojn ĉiuj povis mendi mem.



Lanĉo de tri libroj

Siajn du tradukojn el Esperanto en la ĉeĥan lingvon lanĉis per „bapto“ (ĉeĥa kutimo) Jindřiška Drahotová la 21-an de marto 2022 en Mladá Boleslav en centro Klementinka. La rolon de baptopatrino akceptis ĵurnalistino Eva Jarošová. La libroj estis **Zápisky z Iránu** (*Mia instru-laboro kaj impresoj en Irano*) de Tereza Kapista (1930-2016) kaj **Mise** (*Esploro-vojaĝo*) de Jules Verne, lasta kaj nefinita romano, en kiu havis gravan rolon ankaŭ Esperanto.



En la sama loko ŝi lanĉis sian trian tradukon la 23-an de majo 2022, nome la libron **Bona Espero** de Roman Dobrzyński pri samnoma infanhejmo en Brazilo. Ĉi-foje baptopatris vicurbestro Daniel Marek.



fotoj Zdeněk Kolín

Václav Hollar (Wenceslaus Hollar Bohemus)

(eseo)

„Se ne ekzistus Hollar, ni ne konus London-on...

Ĉu tiun troig-eldiron iu leganto povas toleri - estas la demando...



Sed la brita fakulo tuj daŭrigas: ... „Ni sciis preskaŭ nenion pri la aspekto de Londono antaŭ la granda incendio en la j. 1666, se ĝin ne bildigus Wenceslaus Hollar. La t.n. La „Longa panoramo de Londono estas

nekredeble detala.“

Václav Hollar (alterne Wínceslaus) (1607 – 1677) naskiĝis sur la sojlo de turbulenta tempo, kiu en fajro kaj fulmo de la tridek-jara milito ekskuegis ĉiujn spiritajn kaj moralajn sekurecojn.

Václav naskiĝis en Prago, kies artplenan medion instigis kaj forte influadis la imperiestro Rudolf II. (alterne Rudolfo la Dua). La kunvortaĵo „rudolfinská Praha“ – la Prago de Rudolfo – estas ja fenomeno en la mondo ne preterlasebla kaj la beataj spuroj de tia tempo estas la fundamento de Prago kiel „baroka urbo“.

Ni ne okupiĝas pri la familio Hollar, nur tion ni menciu, ke la patro de Václav, kvankam neniuj gravulo, fariĝis tamen „persono grava“ – respondeca oficisto en la kabineto de Lando-posedaĵo-registrado (Zemské desky), rekte en la Burgo Hradčany.

Do, oni povas diri, ke en la vejnoj de Václav fluis „baroka sango“, kiu formis lian personecon. Dank'al sia patro li

havis en la Burgo eblon estadi en atelieroj de la plej famaj majstroj, kiujn mem la Imperiestro allogis en la landon, kaj kiuj precipe lokiĝis en la urbo kaj en la burgo-kvartalo Hradčany.

La 20-jara Václav, jam matura artisto, foriras el Prago kun amaso da ĉeĥaj (bohemiaj kaj moraviaj) protestantoj, ekzilantoj, post la milita katastrofo sur Blanka Monto apud Prago.

Surprize, ke lin ne allogis la „lando de baroko“ – do Italio, sed li aldirektis sin en la germanan urbon Frankfurto ĉe Majno, kie li enlertiĝis en gravur-faka ateliero de la fama majstro Matthaus Merian.

Lian pluan vivosorton influis konatiĝo kun la angla nobelo Thomas Howard, grafo Arundel, kiu tiam vojaĝis tra Eŭropo kiel ambasadoro de la angla reĝo.

Hollar al li ofertis siajn servojn, kaj de tiam li jam dokumentis lian tutan misian vojaĝon (perbilde, desegnomaniere).

En la j. 1636 li forveturis en Anglion, kie li lokiĝis por ĉiam. Li fariĝis arĥivisto de artkolektaĵoj de sia mecenato Arundel. Li fiksas sian vivon en Londono. Li havis monon, edziĝis, naskiĝis unu filino kaj unu filo. Komenciĝis la plej fruktodona periodo de lia vivo.

Sed poste en Anglio ekestis la konataj tempoj de konfliktoj, kiuj gvidis al la civitana milito. Hollar forveturis en Nederlandojn kun la grafo, ankaŭ kun siaj familianoj. Kiam li en la j. 1652 revenis en Anglion, la „feliĉo turnis al li dorson“...

Mortis lia edzino, kaj pro nigra pesto ankaŭ lia filo. Kiel bildartisto li estis plu alte pritaksata – sed ne monokoncerne! La ekzekuto de la reĝo Charles I (en la j. 1649) estis ankaŭ fino de la reĝa favoro al Václav Hollar.

La nova reĝo – filo de la antaŭa – Karolo la 2-a pli interesiĝis pri siaj metresoj (eksteredziĝ- amatinoj), ol pri bonfarto de la artisto (Rim.: des pli frapa ironio, ke V. H. estis desegnoinstruisto de la infanjuna princo). Do, Václav jam ne estis favorato de la reĝa korto, nun li vivtenis sin precipe kiel ilustristo por eldonejoj.


Ne pro aventuremo, sed pro malfacilaj vivkondiĉoj, jam estinte 62-jara, Václav Hollar viciĝis al la ekspedicio en Afrikon, kiun entreprenis la nepo de lia iama mecenato, ankaŭ la grafo Howard Arundel, kaj kiun Václav same abunde kaj precize dokumentis. Gravaj estas liaj grandlarĝaj desegnaĵ-verkoj de la maroka urbo Tanger, precipe de ties citadelo.

Václav Hollar mortis en Londono, en la j. 1677, preskaŭ forlasita kaj preskaŭ forgesita...

Nun ni menciu la bone konatan leĝon: „kion la historio malnova kaŝ-forgesas, la nova malkaŝas.“ Same okazis ankaŭ rilate al nia Václav Hollar. Apud la desegnaĵoj de Leonardo da Vinci estas la plej valora artjuvelaro de la reĝino Elizabeto la 2-a ĝuste la desegnaĵoj de Wenceslaus Hollar Bohemus (deponitaj en la burgo Winsdor). Kvankam ili estas tre delikataj artefaktoj, kiuj „timas la lumon“, la Reĝino tamen kelkajn pruntis por la retrospektiva ekspozicio, kiu okazis en Prago, en la j. 2019 – 2020.

Nun, kiam ni priskribis (nur enkadre) la biografion de la bildverkisto Václav Hollar, ni transiru al kelkaj, almenaŭ al la plej frapaj verkoj de li.

(Rim.: Ni nomas ĉiujn „desegnoj“, kvankam multaj estis fine refaritaj en aliaj grafikaj teknikoj, precipe gravuraj).



Certe la plej fama estas verko „Dobrá kočka, která nemlsá“ (*Bona estas nefrandema kato*). Ne atendu la klarigon de tiom neordinara titolo; ĝis nun neniu en la artmondo malkovris la enigmon. (Denature

ĉiu kato estas „frandema“, ĉu...) Oni povas supozi, ke tio estas lia rememoraĵo al la junaĝo en Prago (kiu tiam abundis je ratoj kaj certe je katoj).

Ĝi ja estas „la plej fama“, sed certe ne unusola tiaspeca objekto de la artisto.

La Nacia Galerio Praha listigas en sia deponejo Hollareum ĉirkaŭ 5500 desegnaĵojn, kaj inter ili videblas, ke V. H. ŝatis ĉiujn objektojn vilajn („harozajn“), kaj tiujn li precize prilaboradis. La „kato“ ne estas unusola besteto, estas eĉ „bestoj – bestegoj“ – li kiel la unua dokumentis por eŭropanoj elefantojn (en cirko); troviĝas tie teneraj estaĵoj kiel papilioj, fiŝoj, ostroj, abundas floroj kaj fruktoj.

Kio estas afero unika – estas la „katalogo“ de kostumoj, kiuj speguligas la modon en Londono, en Amsterdamo, en Prago.

(Rim.: mi kuraĝas diri, ke la pragaj urbaninoj ne estis plej elegantaj! M.T.).

Ĉe la vestaĵoj por la vintro-sezono oni povas admiri kaj ĝui ĝuste la bele prilaboritajn peltojn (duonmanteloj, pelerinoj, mufoj). Ĉe la kostumoj por varmaj sezonoj nin allogas la flandraj puntaĵoj, kiuj ornamis kaj virinajn kaj virajn vestojn. Sed nia koro „degelas“, se ni alrigardas abundajn bukedojn da floroj. Plej ofte estis bildigitaj tulipoj, tiam valora raraĵo, kies bulbetoj estis „pagitaj per oro-mono.“ (Rim.: Devene de sub-altajaj ebenoj, tra Turkolando kaj Persio ili alvenis al la Neder-landoj).



Václav Hollar elkreis kelkajn vedutojn de Prago, inkluzive larĝajn panoramojn, kaptitajn de la dekliva flanko de Petřín. Laŭdire li estis „artisto-kronikisto.“ Oni povas supozi, ke kelkajn desegnaĵojn li faris jam kiel urbano, kiel juna lerta desegnisto. Sed la plej gravaj estas faritaj okaze de lia unua (kaj lasta) vizito, en la j. 1636). Ni jam menciis, ke la grafo Arundel estis ambasadoro de la angla reĝo Charles I, koncerne la eventojn, kiuj estas bone konataj el la historio. En Prago li restis 7 tagojn – ĉar li avidis vidi la famegajn art-kolektojn de la imperiestro Rudolfo. Li loĝis en la subburga kvartalo Malnova Urbo. Kaj Václav estis lia favorplena „ĉicerono“ tra sia amata naskiĝurbo, kaj eĉ tra la kolektoj en la Burgo (Hradčany).

Certe dum la menciitaj tagoj maturiĝis en li ideo, ke li strebos mezuri siajn artkapablojn per panoramo de Prago, per la

fata defio, kiu surpresas ĉiun artiston, kiu naskiĝis en tiu ĉi fascina urbo, kiu renkontiĝis kun Prago kiel kun granda brilanta vizio, kiun oni povas neniam forviŝi el sia memoro. Václav ekuzis sian nemultan liberan tempon kaj desegnis grandan alrigardon al Prago de Petřín (krom aliaj desegnaĵoj).

Kompreneble, ke la plej multajn verkojn li elkreis en Londono.

Londono: en la tempo de Václav Hollar-alveno ĝi estis urbo, kiu havis ankoraŭ mezepokan aspekton kaj karakteron. Ĝi ja ankoraŭ estis „la urbo, kiu inspiris Ŝekspiron“ (†1616). (Rim.: komparu la tiaman „barokan Pragon“).

Dankema Hollar memkomprene kiel la unuan objekton de sia verkado kaptis la larĝspacan rezidejon de sia patrono, ĉar la loko al la artisto mem (ankaŭ al la hodiaŭa spektanto – al tiu nur el la bildoj) efikis per sia hejmeca kaj intimeca ĉarmo. La elrigardo el fenestro prezentis al li loĝdomojn, mastrumdomojn, hejmkapeleton, servistarspacojn, kuirejon, ŝedojn, lignotenejojn, stalojn, forĝejojn, ĉarŝirmejojn, kokinejojn, kolombejon.

Kiom agrable estas vidi jenan patriarĥan manieron de tiama vivo. Ankaŭ por la nuntempa vizitanto, kiu eble havas opinion, ke Londono konsistas (= konsistis) nur el palacoj kaj domegoj kaj avenuoj (kiuj estis konstruitaj post la granda incendio 1666). Sed por la nacia historio estas pli grave scii, kiel aspektis la Urbo staranta tiam sur la loko pli ol 1 500 jarojn. Kaj pri tio meritas Wenceslaus Hollar, tiam la plej fama Bohemus. En liaj verkoj oni „legas“ poezion, al kiu ĉiu spektanto cedas.

M. Turková, bildoj el Vikipedio

30 jaroj de la eldonejo KAVA-PECH

La 9-an de junio 2022 en la centro de tradukistoj kaj interpretistoj (placo Senovážné 23, Prago) okazis soleno omaĝe al 30-jariĝo de la eldonejo KAVA-PECH, kiu fondiĝis en 1991 kiel kongresa agentejo, sed ekde 1992 eldonas librojn.

En la antaŭcambro estis preparita ne-granda libroservo.



La programon komencis aktorino kaj kantistino Jolana Smyčková kun du siaj etaj filoj Ríša kaj Christian Haan. Akompanis ilin la direktoro de la teatro Semafor Jiří Svoboda. Omaĝe al sia patro Miroslav Smyčka ŝi kantis unu kanton en Esperanto, nome Steletoj (*Steloj, adiaŭ nun, dormos mi jam*). La knabetoj kantis faman infanan kanton pri kokcinelo (*Sluničko, sluničko, popojdi maličko*).



Poste Petr Chrdle prezentis agadon de sia eldonejo kaj precipe du stokojn da libroj (ĉeĥlingvaj kaj esperantlingvaj), kiuj pro pandemio dum la lastaj du jaroj ne povis esti „baptitaj“ (lanĉitaj). Li invitis du virajn „parcojn“ aŭguri feliĉon al la libroj. La ĉeĥajn benis Petr Kautský, sekretario de la tradukista-interpretista asocio, la Esperantajn Tomáš Břicháček, prezidanto de EK Praha. Petro Chrdle ankoraŭ dankis al siaj kunlaborantoj (aŭtoroj, tradukistoj, korektistoj, ilustristoj) kaj kelkajn el ili invitis al solena tosto.



En la intercambro estis preparita mal-granda bufedo por ĉiuj gastoj inkluzive de torto.

-mm-
foto J. Malá, P. Dvořáková

Sjezd Českého esperantského svazu

Pardubice 16/18.10.2022

Po třech letech (poslední sjezd byl v Brně v roce 2019) se dle stanov opět musí konat sjezd svazu s volbou nového svazového výboru (vloni v Bartošovicích byla jen konference bez volby výboru).

Sjezd se uskuteční v Pardubicích, kde v roce 2020 Lenka Angelová připravovala konferenci, kterou znemožnil koronavirus a ona sama se stala jeho obětí. Letošní sjezd bude tedy i na její počest. A také na počest její matky Jarmily Rýznarové, která zemřela o čtyři měsíce dříve a jejíž poslední článek právě vyšel v brazilském Almanako Lorenz 2021.

Škola má dvě budovy – ta naše, kde se uskuteční sjezd, má adresu **Domov mládeže a školní jídelna Pardubice, GORKÉHO 350!!!** (ne Rožkova, jsou to sousední ulice).

V programu kromě sjezdového jednání bude i divadelní představení v esperantu studentského souboru DOMA ze Svitav. Plánuje se také návštěva hvězdárny.

Elektronická přihláška bude na stránce <https://esperanto.cz/aligxilo2022>

Almanako Lorenz 2021 el Brazilo alportas 35 interesajn artikolojn de famaj esperantistoj (ekz. Trevor Steele, Renato Corsetti, Sara Spanò, Ans Bakker-ten Hagen), inter ili ankaŭ de **Stano Marček** (*Esperanto per rekta metodo*) kaj de **Jarmila Rýznarová** (*Historio de Esperanto-klubo en Třebíč komune kun la historio de la tendaro en Lančov*). Verŝajne ŝia lasta verko.

Program sjezdu ČES, Pardubice 16.-18. 9. 2022

Pátek – příjezd a ubytování účastníků
– večere
– večerní program (DOMA)

Sobota – hlavní sjezdové jednání
9-12.30 členská schůze (zprávy o hospodaření a o činnosti ČES a jejích organizačních složek, volby nového výboru pro funkční období 2022-2025.)

12.30 – 13.00 oběd
13.15 společné focení
14.00 odpolední program
18.00-19.00 večere
20.00-24.00 společenský večer s hudbou

Něděle
7.30-8.30 snídaně
9.00-11.00 projednání sjezdové rezoluce
12.00-13.00 oběd

La 18-a ĈEA-kongreso

okazos ĉi-jare en Pardubice (16-18 oktobro 2022) en junulara hejmo (Domov mládeže a školní jídelna Pardubice, Gorkého 350). La ĉefa tasko de la kongreso estas elekto de nova ĈEA-komitato.

Kompreneble estos ankaŭ kultura programo kiel teatraĵo, astronomia observ-ejo, libroservo, dancvespero.

Esperanto en Pardubice

havas grandan tradicion. La loka klubo estis fondita jam en 1909, aktivis tie nia unua esperantista poeto **Stanislav Schulhof** (1864-1919), kies nomon la klubo nun portas. Dum socialismo Pardubice famiĝis per **Renkontiĝoj de Pacdefendantoj**, kiujn organizis **Karel Franc** (1925-2015), kiu ankaŭ gvidis ekzamenan komisionon de ĈEA kaj instruistojn en la tendaro de Lančov. Post 1990 en Pardubice konstituiĝis **Asocio de Esperantistaj Handikapuloj**, ĉe kies fondo staris **Josef Vaněček** (1923-1998) kaj **Jarmila Rýznarová** (1929-2020). En Pardubice vivas ankaŭ **Josef Hron** (*1933), kiu prilaboras elektronikan vortaron ĉeĥan-esperantan, unu el plej grandaj Esperanto-vortaroj.

El la mondo

Duolinga kurso de Esperanto por ĉinoj verŝajne ne realiĝos, kvankam ĝi estas jam preskaŭ preta. Esperanto-kursoj baziĝas sur volontula laboro, kiun Duolingo ne plu akceptas pro financaj kaj politikaj motivoj, do la daŭrigado de Esperanto-kursoj estas neklara.

Esperantan literaturon en la korean tradukas Jeong Ryeol Jang. De julio Baghy li enkoreigis romanojn *Viktimoj* kaj *Sur sanga tero*, De Tibor Sekelj *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, plue li tradukas verkojn de Spomenka Ŝtimec, Mikaelo Bronŝtejn, Bakin Palivoda kaj aliaj.

Esperanto Nederland estos gvidata de konata lingvisto Marc van Oostendorp, profesoro pri nederlanda lingvo (universitatoj en Nimego, Lejdeno, Toronto) kaj docento pri Interlingvistiko

kaj Esperanto. Li gvidis ankaŭ projekton pri enkomputiligo de leteroj inter Kalocsay kaj Waringhien, [rete atingebla](#).

Elekta komisiono de UEA anoncis, ke kiel gvidanto de la asocio por la periodo 2022-2025 estas denove proponata Duncan Charters, kiel vicprezidanto Amri Wandel, kiu ĝis nun respondecis pri scienca-faka agado, Mez-Orinto kaj Norda Afriko. Nove proponataj estraranoj estas Aurora Bute kaj François Lo Jacomo (tiu akre kritikis la intencon vendi UEA-domon). Inter komitatanoj C estas proponata ankaŭ Gbeglo Koffi, kiu estis en konflikto kun UEA kaj kreis eĉ konkurenca asocion en Togolando.

Pri vendo de UEA-domo en Roterdamo ni jam informis en la pasinta numero (p. 4). Maklerista firmao proponas ĝin kontraŭ 1,8 miliono da eŭroj. La domo havas entute 520 m² en kvar etaĝoj, la plej granda estas la subtera keletaĝo. UEA havis en la domo sian sidejon preskaŭ 70 jarojn. La libroservo transiros al Slovakio ([E@I](#)) kaj la biblioteko Hodler al la viena muzeo. Ĝis nun ne aperis interesiĝanto pri aĉeto.

Filozof-esperantisto. Rudolf Carnap (1891–1970), germana filozofo kaj logikisto, kiu fuĝis el Germanio pro naziismo, ekde sia 14-a jaro ĝis la morto uzis ankaŭ Esperanton, kion li meciis en sia aŭtobiografio.

Nova prezidanto de Esperanto-Asocio en Finnlando akre kondamnis la rusan atakon kontraŭ Ukrainio, ĉiujn diktatorojn kaj ankaŭ la neŭtralecon de UEA, ĉar malbonuloj venkas tiam, kiam bonuloj nenion faras.

MESAĜO DE UEA AL UN KAJ CIVILA SOCIO OKAZE DE LA MONDA TAGO DE RIFUĜINTOJ, 20 JUNIO 2022

[Mesaĝo sendita al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj, Esperantaj kaj neesperantistaj, plusendi al koncerna(j) registara(j) oficejo(j) kaj al deputitoj. Ni ankaŭ instigas al lokaj grupoj marki la tagon per loka agado. Dankon!]

Laŭ lastatempa pritakso de Unuiĝintaj Nacioj, la nombro de rifuĝintoj kaj dislokitaj personoj en la mondo nun superas 100 milionojn. Tio estas pli ol iam ajn antaŭe. Ili troviĝas en ĉiuj mondopartoj – ekzemple en Eritreo kaj Etiopio, en Jemeno kaj Sirio, en Mianmaro, en Kolombio, en Ukrainio kaj en ties najbaraj landoj. Oni fuĝas pro persekutoj (raso, religio, nacieco, socia identeco), militoj kaj naturaj katastrofoj. Oni ofte fuĝas sen mono, sen nutraĵoj, kaj al lokoj sen sanaj servoj, sen edukado, sen konata lingvo. Tiuj elradikigoj ne nur kaŭzas nuntempajn personajn katastrofojn, sed montras al akumuligantaj estontaj problemoj. Universala Esperanto-Asocio, kiel tutmonda neregistara organizo, memorigas, ke sekureco estas fundamenta homa rajto, kaj ke rifuĝintoj estas inter la plej vundeblaj homoj tiurilate. La Konvencio pri Rifuĝintoj, de 1951, konfirmas la bazajn rajtojn al laboro, loĝado, edukado, asistado, aliro al dokumentoj kaj al justeco. Sed eĉ en plej bonaj cirkonstancoj la nombro de rifuĝintoj tra la mondo superas la kapablon de la ŝtatoj (kiuj ofte mem kulpas pro la problemoj) prizorgi ilin kaj garantii iliajn rajtojn. Inter la pluraj

malfacilaĵoj por plene aliri tiujn rajtojn, estas lingvaj baroj.

Kiel parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto, membroj de UEA estas aparte konsciaj pri esencaj lingvaj rajtoj. Lingva subteno gravas, se oni volas trakti rifuĝintojn juste kaj digne. Rifuĝintoj bezonas aliri informojn en lingvoj kiujn ili komprenas. Ili ankaŭ bezonas helpon por instruiĝi pri lingvoj kaj ĉiutaga vivo. Krom instrui rifuĝintojn, necesas klerigi ŝtatajn funkciulojn, sekurecajn fortojn kaj helpantojn de neregistaraj organizoj – kaj precipe aŭskulti la voĉojn de rifuĝintoj pere de ties lingvoj. Iliaj infanoj rajtas al plenaj edukaj servoj en lingvoj kiujn ili komprenas.

UEA alvokas al ĉiuj – al Unuiĝintaj Nacioj, al registaroj, al civila socio kaj civilaj institucioj – ke ili kunlaboru por forigi la kaŭzojn de rifuĝo, kaj ke ili donu sian helpon, malfermu siajn limojn, kaj liveru servojn al rifuĝintoj ĉie. Kaj ĉefe nia Asocio alvokas al la internacia komunumo ke ĝi kune kaj solidare traktu la problemon, kaj per paca kaj humana kunlaboro forigu ĝiajn kaŭzojn.

Lančov 2022



2022-07-17/30 Unua etapo de SET Lančov
2022-07-31/-08-12 Dua etapo de SET Lančov
2022-08-12/14 Renkontiĝo de ekstendaranoj
info: let.lancov@seznam.cz

PLI JUSTA KAJ PLI EFIKA EŬROPO - ALVOKO DE LA KONFERENCO PRI LA ESTONTECO DE EŬROPO AL EU

Plibonigita lingvolernado por pli justa kaj pli efika Eŭropo

Kun granda intereso parolantoj de la internacia lingvo Esperanto sekvis la Konferencon pri la Estonteco de Eŭropo. Multaj civitanoj de Eŭropa Unio enmetis ideojn al tio. Kaj multaj el tiuj ĉi pledis por efika kaj agokapabla Eŭropo kaj por plifortigo de la eŭropa identeco. Finfine nepre temas pri valoroj kaj rajtoj, pri la bazo de la formado de demokratia volo kaj pri la konservado de lingva diverseco en EU.

Precipan atenton meritas la ideoj de

- Efika instruado de fremdaj lingvoj unue per propedeŭtika uzado de facile lernebla lingvo en bazlerneja aĝo kaj
- Agnosko de Esperanto, kiel vivanta lingvo kun kulturo kreskinta de pli ol 130 jaroj, kiu estas jam regule parolata de civitanoj en ĉiu lando de EU.

Ni ĝojas, ke ankaŭ Esperanto estas menciata en la platforma raporto (Februaro 2022) eĉ 22 fojojn pro la multaj kaj multe subtenataj ideoj esprimitaj de la eŭropaj civitanoj pri manieroj, por konservi Eŭropon multlingva kaj tamen interkomunikanta en justa maniero. Tial estas strange, ke tio estas konsiderata en neniu el la 49 proponoj de la fina plenkunsido.

Kiel jam aliaj rimarkis, estis problemoj en la transdono de la ideoj de la civitanoj al la postaj diskut-niveletoj, pro kio ni insiste petas, ke en la plenumado de la decidoj oni revenu al tio, kion la civitanoj proponis kaj en nia kampo oni apliku Rekomendon 32 de Eŭropa Civitana Panelo 1 por teni Eŭropon eŭropa kaj multlingva.

Tial ni alvokas EU, kuraĝigi la eduk-ministeriojn de ĉiuj 27 EU-landoj, reprodukti la lernejan programon "Multilingual Accelerator" (vidu Proponon 23893) sub profesia pedagogia super-rigardo kaj en pli granda skalo, por testi la efikecon de tiu ĉi noviga aliro.

Gazetaraj komunikoj de UEA

Promeno tra Arbarista Panteono

La 21-an de junio 2022 la Esperantista klubo en Brno elprovis unu el la vojoj de la [Arbarista Panteono](#), nome la vojon Vojanka (Soldatino).



Miroslav Malovec, Marie Malá, Oldřich A. Fischer, Martin Sedlák, Václav Zouzalík, Miroslav Hruška kun hundeto Arni, Milan Kolka, kiu fotis per aŭtomato

„Setkání v muzeu“ a vernisáž výstavy Fakaj asocioj ve dnech 21. – 23.10. 2022

Pátek :

18:00 hod. – večeře

19:30 hod. – Poludnica – krátký film +
vyprávění Petera Baláže a dalších
účastníků

Sobota:

9:30 hod. – vernisáž výstavy – uvítání
hostů, zdravice

10:00 hod. – přednáška o F.V.
Lorencovi – Libuše Dvořáková

10:30 hod. – představení knih Petra
Chrdleho a Petera Baláže

12:00 hod. – oběd

13:30 hod. – přednáška IFEF kongres –
Ladislav Kovář

15:00 hod. – přednáška KAEST dříve –
Petr Chrdle

16:00 hod. – přednáška KAEST nyní –
Peter Baláž

17:30 hod. – večeře

19:00 hod. – „Hrátky s čertem“ –
divadlo DOMA

20:00 hod. – návštěva esperantistů na
Madagaskaru – Mária Pilková

Neděle:

9:00 hod. – 100 let od narození Eli
Urbanové – Petr Chrdle + Recitace
básní – Mária Pilková

10:15 hod. – Zpráva o činnosti Klubu
přátel esperanta ve Svitavách

Ĉantorio

La 22-an de junio 2022 la Esperanto-
klubo de Vítkovice faris tradician
supreniron al la monto Ĉantorio.



Esperanto en amaskomunikiloj

Petr Chrdle en Kukátko. *Dobřichovické Kukátko* estas kvaronjara informilo de la urbo Dobřichovice, kie loĝas Petr Chrdle. En la somera numero aperis intervjuo kun li okaze de la 30-jariĝo de lia firmao KAVA-PECH, kiu eksportas librojn al 63 landoj. En la kvarpaĝa teksto estas plurfoje menciita Esperanto. www.dobrich.cz/kukatko.htm

Otokar Březina naskiĝis en la urbo Počátky, kie en lia naskiĝdomo troviĝas lia muzeo. *Toulavá kamera* (Vagema kamerao) de la Ĉeĥa Televido elsendis la 26-an de marto 2022 raporton pri la muzeo, kie sur murgazeto estis videbla esperantlingva publikaĵo **Moje matka – Mia patrino**.

Poetino Věra Ludíková reeldonis libron *Kantáta 1 + 5* (do ses lingvoj) kaj la 14-an de aprilo 2022 en salono de konstruaĵo Život 90 en Prago ŝi prezentis la libron per aŭtora legado. Esperantlingvan tradukon de Jaroslav Mráz tralegis Margit Turková.

Jolana Smyčková kaj Richard Haan, kantistaj geedzoj, koncertis la 12-an de majo 2022 en Semafor kaj memorigis tiel 5 jarojn post la forpaso de **Miroslav Smyčka**.

Otrocké esperanto (sklava Esperanto) estis titolo de televida programo la 17-an de majo 2022 pri sklavoj en la 17-a jarcento, kiuj kreis sian propran lingvon por interkompreniĝi en sia malfacila situacio. Ili estis transportitaj el diversaj anguloj de Afriko al Kolombio, ilia piĝino *palenkeró* estas miksaĵo de lingvoj afrikaj kaj eŭropaj koloniistaj.

Nelacigebla Milada Zemanová denove partoprenis en televida konkurso, ĉi-foje en Televido Barrandov en programo *Šťastná sedmička* (Feliĉa sepo) la 17-an de majo 2022 kaj menciis Esperanton kiel sian hobion.

En informilo de Silezia Teatro Opava (junio 2022) aperis artikolo de Vlastimil Kočvara pri la nova eldono de KAVA-PECH, nome pri teatraĵo **Manon Lescaut** de Vítězslav Nezval laŭ samnoma novelo de franca aŭtoro Abato Prévost. La dramigon de Nezval esperantigis Jiří Kořínek kaj la silezia teatro en aprilo 1968 partoprenis kun Manon festivalon en Zagrebo, sed post reveno al Ĉeĥoslovakio ĝi sukcesis realigi nur unu spektaklon en Jablonec la 4-an de aŭgusto 1968. Okupacio kaj t.n. renormaligo malebligis aliajn spektaklojn.

Kolringo de travivaĵoj ĉe la bohemia-moravia limo estas projekto por propagandi la regionon inkluzive de Svitavy kaj nia Esperanto-muzeo. Inkluditaj estas urboj Litomyšl, Moravská Třebová, Polička, Svitavy, Vysoké Mýto. Ĉiu el la urboj estas unue prezentita kiel turisma celo, poste sekvas la plej interesaj objektoj en la urbo. Inter la plejoj de Svitavy aperas ankaŭ nia Esperanto-muzeo apud la urba muzeo, la historia placo, parko de Jan Palach kun monumento de Oskar Schindler, arbaroj de akvorezervejo kaj areo Brand kaj ĝuovojo de koboldo Sváťa.

<https://www.ceskomoravskepomezi.cz/nahrdelnik-zazitku-z-ceskomoravskeho-pomezi/>

KER-ekzamenoj

Inter la 17-a kaj 20-a de novembro 2022 okazos KER-ekzameno en kastelo Bartošovice. KER-ekzameno daŭros nur unu tagon. La ekzamenoj okazos jene: en skriba formo niveloj B1, B2, C1 kaj en parola B1, B2, C1.

KER-ekzamenojn gvidos sinjorino Katalin Kovacz kaj KER-komisiono de UEA.

Kiu ŝatas veni kaj fari ekzamenon, tiun mi petas tuj informi min. Vi ankaŭ povas tion fari pere de telefona numero esperanto.info 00420 774562047 aŭ 608124823. Skribe vi povas fari tion pere de mesaĝo verdastacio@gmail.com.

KER = Komuna Eŭropa Referenc-kadro por Lingvoj

B = Memstara lingvo-uzanto

B1 – Salto. Li kapablas kompreni informojn en klaraj kaj laŭnormaj tekstoj, kiuj temas pri konataj temoj, rilataj al oftaj situacioj en la kampo de laboro, lernejo, libertempo ktp. Li kapablas elturniĝi en la plimulto de situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en teritorio, kie la lingvo estas parolata. Li kapablas produkti simplan tekston pri temoj, kiuj estas konataj por li aŭ rilataj al lia intereso-kampo. Li kapablas priskribi travivaĵojn kaj okazintaĵojn, revojn, esperojn kaj ambiciojn, kaj doni argumentojn kaj klarigojn pri opinioj kaj planoj.

B2 – Flugo. Li kapablas kompreni la ĉefajn ideojn de kompleksaj aŭ abstraktaj tekstoj, inklude konversaciojn rilate sian fakterenon. Li kapablas flue kaj nature interagi kun denaska parolanto, sen

kaŭzi al la parolpartneroj fortostreĉon. Li kapablas verki klaran kaj detalan tekston pri larĝa gamo da temoj, kaj esprimi sian opinion pri aktuala temo, listigante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de diversaj ebloj.

C = Profesinivela lingvo-uzanto

C1 - Proksime al pinto. Li kapablas kompreni larĝan gamon da postulemaj kaj longaj tekstoj, rekonas la implicitajn signifojn. Li kapablas flue kaj spontane esprimi sin, sen ofte serĉi esprimojn. Li kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike por sociaj, porstudaj kaj profesiaj celoj. Li kapablas verki klaran, bone konstruitan, detalan tekston ankaŭ pri pli kompleksaj temoj, kaj dume kun certeco aplikas la tekstoredaktajn ŝablonojn, konjunkciojn, tekstokunligajn elementojn. Temas pri strikte lingvaj konoj.

Konferenco de la ĉefaj ferojistoj-esperantistoj



Ĉeĥa Ferojista Esperanto-Asocio konferencos en la somerumejo Prudká (proksime de Tišnov) en la tagoj de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2022.

Aliĝilojn akceptas Anna Abelovská ĝis la 27-a de junio 2022 (postulo de la somerumejo) je la adreso ulice Gutova č. 26, 100 00 Praha 10, tel. 607170743

annaabelovska@seznam.cz

7.10.2022/8.10.2022 loĝado

8.10.2022/9.10.2022 loĝado

7.10.2022 vespermanĝo

8.10.2022 maten-, tag-, vespermanĝo

9.10.2022 maten-, tagmanĝo

Nenia mistero

...kvankam eble tia ŝajnas la opinio, ke plantoj ankaŭ havas sentojn. Ke ili kondutas al homoj same kiel homoj kondutas al ili. Ĉu nia leganto ne spertis mem, ke la vegetaĵoj prosperas, se kun ili oni trajtas ŝate (eĉ amece), kaj malprogresas, se ili estas neprizorgataj? Se ili sentas la homan intencon esti forigitaj – ili memsekiĝas. (Tion mi foje spertis. M.T.)

Post tia abstraktaĵo – kia satisfakcio legi (kaj vidi) la titolon, la fotojn, ke: *la Bioteknologia firmao Photon Systems Instruments kune kun fakuloj de la Masaryk-universitato kaj ties scienc-instituto Ceitec, en BRNO konstruis la aparaton, kiun ili nomis „We speak plantish“ (Ni parolas plant-maniere). La aparato estis prezentita ĉe la tutmonda ekspozicio EXPO en Dubajo (kiu finiĝis je la 31-a de marto). Vizitis ĝin ĉirkaŭ 20 milionoj da homoj kaj ili povis admiri la sukcesan laboron de ĉeĥaj sciencistoj. La prezentita aĵo plene kongruas kun la ĉeftemo de la Ekspozicio: **Kunligi ideojn kaj tiamaniere progresigi la estonton de la Mondo.***

Jen priskribo kaj funkcio de la aparato:

Ĝi helpas al agrikulturado. Ĝi ja estas plene aŭtomatizita robot-instalo, kiu kapablas indiki, kiel plantoj reagis al diversaj fenomenoj: varmo-malvarmo, lumo-mallumo, al muziko, al aliaj „ŝokoj“... Surbaze de la tralegitaj datoj oni povas proponi la plej taŭgajn zorgojn por koncerna vegetaĵo, ke ĝi prosperu optimume. Laŭ la vortoj de Ester Jarour (la reprezentanto de Ceitec MU): „Jen la inteligenta teknologio ebligas al ni kompreni la nuancojn de la fascina planto-lingvo tiamaniere, ke ĝin transformas en la formaton, kiu estas

komprenebla por homoj. Ni diras, ke „ni parolas kun la plantoj“.

La aparaton ili nomumis „La legilo de la plantosentoj“ – do kongrue kun la nuntemp-teĥnologia ĵargono, ĉu!

*Laŭ PRÁVO /31.3.2022/ modife
esperantigis Margit Turková*

Rim.: En Dubajo estis kelkmil eksponaĵoj, el kiuj la organizantoj elektis 20 la plej interesajn, kiujn la vizitantoj nepre vidu. Ĉi tiu eksponaĵo estis sur la 11-a loko. La aparato funkciis antaŭ la okuloj de la vizitantoj, kvankam ĝi estis telekontrolata el Drásov apud Brno. Pri la aparato montris intereson multaj universitatoj en la mondo. Vidu [retejon](#) pri la ĉeĥa sukceso.

Elŝuteblaj libroj el Hungario

László Pásztor (1940-2021) estis hungara esperantisto, kiu dum 7 lastaj jaroj de sia vivo suferis tre doloran malsanon. Por forkonduki sian atenton de la doloro li komencis esperantigadi hungarajn klasikaĵojn kaj lia vidvino nun disponigis liajn tradukojn al la esperantistaro en PDF-formato en la Hungara Elektronika biblioteko:

Filoj de l' ŝtonkora homo - Mór Jókai
<https://mek.oszk.hu/23000/23015>

La homo nevidebla - Géza Gárdonyi-
<http://mek.oszk.hu/19300/19359/>

La Nigra Urbo - Kolomano Mikszáth
<https://mek.oszk.hu/22700/22763/>

Danco de Feinoj - László Pásztor
<http://mek.oszk.hu/19400/19423>

Ŝercoj - László kaj Adrienne Pásztor
<https://mek.oszk.hu/15100/15160/>

Agrablan legadon!

BONA ESPERO


Por legemuloj mi tradukis kaj eldonis libron BONA ESPERO pri lernejo en bieno en meza Brazilo. Roman Dobrzynski – pola ĵurnalisto – tre detale



en interparoloj kun gedzoj Grattapaglioj pri-skribas historion de tiu lernejo kun ĉiuj problemoj kaj sukcesoj.

Ĉar la libro estas en ĉeĥa lingvo, povas al neesperantaj homoj doni sciojn pri Esperanto. La libro havas 376 paĝojn kaj mi volonte sendos ĝin je 230 Kč.

*Jindřiška Drahotová
telefono 720 652 320*



Aliaj du tradukoj de Jindřiška Drahotová el Esperanto (vidu p. 42)

UNESKO-kuriero

Aperis tri novaj numeroj en Esperanto:



Elŝutu el la UEA-retejo www.uea.org

La numero julio-septembro 2021:

Restarigo de viv-diverseco. Revivigi vivon. Pandemioj: Homoj estas la kulpuloj. Indiĝenaj Popoloj: Scipovaj gardantoj de biodiverseco. "Historio ne kompatos tiujn, kiuj negas la faktojn". Migrado de specioj: Kvietaj revolucio. "La protekto de specioj suferas je manko de rimedoj". Afriko: Revenas montaj goriloj. Insuloj: Fragilaj montrofenestroj de biodiverseco. Protekto por cetacoj en la rivero Jangzio. Aŭstralio: Post la arbarfajroj. Urboj: Sovaĝa vivo floras en betonaj ĝangaloj. Titikako: La sankta lago malkaŝas siajn sekretojn. Kion niaj plej ŝatataj televidprogramoj diras pri ni. "La historio de eŭropaj nigruloj estis frapita per parta memorperdo".

La numero oktobro-decembro 2021:

Rakontoj de migrantoj. Niĝeriaj migrantoj: Serĉi revon ĉiakoste. Rifuĝintoj: Moviĝi preter la antaŭjuĝoj. Peruo alfrontas pliĝon de klimataj migrantoj. En Kanado, centro traktas la vundojn de ekzilo. Poŝtelefonoj: Nemalhavebla ilo por migrantoj. Historio de kirgiza migrantino kiu faras sian vojon. La eksterlandaj ĉinoj: Longa rakonto. Arkivoj pri homaj translokiĝoj. "La historio de la homaro konsistas el sinsekvo de migradoj".

La numero januaro-marto 2022:

Ĉu ni timu neŭosciencan? Protekti nian cerban potencon kontraŭ ŝtelo. Kaperi la cerbon: Pli da fantazio ol realo. "Ni devas agi antaŭ ol estos tro malfrue". Ĉilio: Pioniro pri protektado de "neŭrorajtoj". Afrika neŭoscienco: Senespere serĉanta diversecon. Krimeco: Ĉu cerbo-skanaĵo taŭgas kiel pruvilo? Neŭoscienco en lernejoj: Inter miraĝo kaj miraklo. En Ĉinio, espero renaskiĝis por "Infanoj de la steloj" Amazono senvualigita. Etika modo: Ĉu kreska tendenco aŭ malplena retoriko? Degelo de la tundro rekte minacas klimaton. La afrika kino: Industrio en plena kresko.

La elŝuto estas senpaga, sed tre grava, se ni volas, ke Unesco-kuriero plu aperu.

-mm-

VERDEN kaj AMO-SEMINARIO EN GREZILJONO

La seminario okazis inter la 31-a de marto kaj la 5-a de aprilo 2022-a en la Esperanto-kastelo Greziljono. Ĝi estis la dua kunsido post *Parma* en Italio. La seminarion partoprenis 20 geesperantistoj kaj kelkaj pliaj per intereto.



La projekto VERDEN estas subvenciata de Eŭropa Unio kaj kunordigata de la Universala E-Asocio. En ĝi kunlaboras IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) kaj BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo), kun la subteno de Parma Esperanto-Grupo kaj Flandra Esperanto-Ligo. Temas pri internacia kunlaboro pri daŭripovo kaj transporto. Ĝi ricevas subvencion de la nederlanda Erasmus-agentejo. En la projekto partoprenas la jenaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Francio, Italio, Nederlando.

Francesco Maurelli kunordigas la projekton nome de UEA.

La renkonton en Greziljono iniciatis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. La

seminarion malfermis Stefan MacGill. Sara Spanò kaj Francesco Maurelli konigis al ni la programon Erasmus+ kaj la projekton VERDEN. Poste sekvis pluraj prelegoj: Jaroslav Matuška el Ĉeĥio parolis pri fakultatoj kaj projektoj, la juna studento Matěj Berka pri siaj spertoj en la projekto, Christine Brücker pri la danĝeroj de varmiĝo kaj Lars Sözüer pri efiko de la trafiko al la klimato. Rodica Todor parolis pri la politiko de EU rilate al fervojo. Bert Schumann priskribis al ni la verdan vojon sur iama fervojo ĉe Greziljono. Ladislav Hakl legis prelegon de Ladislav Kovář pri eksteraj kaj internaj kondiĉoj por daŭripova fervojtransporto. Boris Mandirola parolis pri "La Eŭropa Verda Pakto - daŭripova moviĝeblo". Franco Bressanin prezentis plurajn filmetojn pri agrikulturo, akvomastumado, verdaj muroj kaj verdaĵoj eĉ en trajno-vagonoj. Vito Tornillo prezentis al ni la hibridajn trajnojn. Ambicia estas la projekto de Lars Sözüer pri retpaĝo por helpi al la planado de trajnaj vojaĝoj kun bicikloj.

Kadre de AMO 84 parolis Stefan MacGill pri fervojoj por daŭripovo. Laurent Vignaud instruis Esperanton al juna Matěj, kiu tre entuziasme mem eklernis Esperanton antaŭ kvar monatoj.

Dum libera tempo la partoprenantoj promenis en la ĉirkaŭaĵo kaj vizitis la urbon *Baugé* kaj ankaŭ ĝian malnovan parton kun spiral-tordita turo. Malgraŭ la ŝanĝiĝema vetero ni pasigis agrablajn tagojn inter esperantistoj.

Bongusta manĝo kontribuis al bona etoso. Bert Schumann tre bone prizorgis la ĉeestantojn.

Liba Gabalda

EL ESPERANTUJO

LA 10-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ 2022

La festivalo estas dediĉita al infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.

Ĉiu partoprenonto bonvolu alsendi vian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – **ĝis la 30-a de junio** – la adreso: festivalo.eo@gmail.com. Tiel okazos konkursa provaŭdo de partoprenantoj. Antaŭ ĉio bonvolu sendi plenigitan aliĝilon. La Festivalo okazos en tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. registrita en studio. **La 12-an de septembro** – rete okazos *Koncerto de la Premiitoj* kaj anonco de rezultoj.

Antaŭ 500 jaroj Magalhães (Mageno) realigis la unuan vojaĝon ĉirkaŭ la mondo (1519-1522). La aventuron priskribis multaj verkistoj (ekz. S. Zweig), inter ili ankaŭ esperantisto **František Omelka** (1904-1960), kies romano *La granda admiralo* estas elŝutebla ĉe la projekto Gutenberg. En Jutubo estas spektebla prelego de **Lorenzo Noguero** pri la vojaĝo, en kiu li ankaŭ mencias la romanon de Omelka.

NOVELO-KONKURSO

Akademio Literatura de Esperanto (ALE) lanĉis la duan eldonon de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK), ĉi-jare sub la temo *Nokta vojaĝo*, kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Du kategorioj:

komencantaj kaj spertaj verkistoj. La ĵurio donacos ok monpremiojn kaj laŭdecide honorajn menciojn. **La limdato por konkursi estas la 30-a de septembro 2022**. Informojn kaj detalojn oni trovu ĉe akademio-literatura.org/ink-2 aŭ bobelarto.ink.

Vortludo furoras ankaŭ en Esperanto.

La anglalingva reta vortludo Wordle publikigita oktobre 2021 de Josh Wardle disvastiĝis tra la mondo en pluraj lingvoj inkluzive de Esperanto.

<https://esperanto.cat/wordle/>

Tabloludo *Jak dobře to u nás znáš?*

(Kiel bone vi orientiĝas nialande?) enhavas kartojn kun demandoj. Tiu pri vilaĝo Herálec apud Havlíčkův Brod enhavas demandon: Kiel nomiĝis instruisto el Zdislavice, kiu inter la unuaj propagandis artefaritan lingvon Esperanto? A. Aleš Hrdlička, B. Heřman Alferi, C. Jára Cimrman (*B estas la ĝusta*).

Esperanto-libroj en Ĉinio estas aprila prelego de WANG Tyanyi ne nur pri esperantlingvaj libroj en Ĉinio, sed ĝenerale pri la futuro de libroj, precipe la paperaj, ĉar la sendokostoj estas ofte kelkoble pli altaj ol la libroj mem kaj la junuloj nun preferas librojn en elektronika formo. Ne malmultaj aĉetas dikajn librojn nur por ornami sian libroŝrankon kaj aspekti kiel intelektuloj. Aliflanke printi bitigitan libron iam kostas malpli ol la sendokostoj, sed poste eldonistoj ne povos vendi siajn varojn.

[E-Libromarkato en Ĉinio.pdf](#)

Okaze de IFEF-Kongreso

Organizantoj de la kongreso en Beroun meritas laŭdon, ke ili por sia kongreso elektis tiel taŭgan lokon! Antaŭ 50 jaroj estis la regiono proklamita **Protektoritorio Ĉeĥa karsto**.

La Karsto estas regiono de kalkoŝtonaj rokoj, de disvastiĝintaj lumplenaj folioarbaroj, de arbostepoj kaj ŝtonostepoj. La regionaj institucioj preparas multajn entreprenojn, el kiuj ni rimarkigu almenaŭ la eksteran ekspozicion sur la ĉefa urboplaco de Beroun, kaj similan en la Muzeo de la karsto. Ĉiuj trajnovojaĝantoj tuj post foriro el la stacidomo Smíchovské nádraží en Prago ekvidos supre dekstre sur alta roko oran skribaĵon „BARRANDE“. Kial?

Joachim Barrande (1799 – 1883)

Li studis en Francio en politeknikaj lernejoj kaj samtempe li ĉeestadis natursciencajn prelegojn. Li fariĝis konstru-inĝeniero, specialiĝis por voj- kaj pont-konstruoj (unu ponto, trans la rivero Loira, ekzistas ĝis nun). (Simile studis lia pli juna frato Joseph, kiu poste servis en cara armeo kaj meritas pro konstruoj de la ruslandaj trajnolinioj).

En 1826 Joachim fariĝis eduk-instruisto en la nobel-familio de la reĝo Karolo X. (reganta 1824-1830) por lia nepo Henri. Post la revolucio (1830) la reĝo kun sia familio, Barrande kune, forlasis Francion; ili trovis rifuĝejon en Edinburgo. Tie B. komencis interesiĝi pri paleontologio. Jam en 1832 ili translokiĝis en Ĉeĥion, en Buštěhrad, sed post nelonga tempo, pro epidemio, ili estis akceptitaj en la Praga burgo (Hradčany), la taŭga rezidejo por reĝoj.

Kiam la reĝa familio forlasis Ĉeĥion, Joachim B. translokiĝis al la subburgo-

kvartalo, Malostranské náměstí, en la domon „Ĉe tri oraj steloj“. Kiel eminenta intelektulo li baldaŭ troviĝis en sciencama societo, kie elstaris grafo Kaspar Maria von Sternberg (instiganto por fondi naciajn muzeon). Lin J. B. vizitadis en lia palaco. Tie li renkontiĝadis kun ties arkivo-prizorganto – František Palacký (k.a.).

La grafo Kaspar von Stenberg estis tiama prezidanto de la Unua privilegia relo-asocio kaj okupis J. B. kiel unuan inĝenieron por la konstruo de la trajnolinio Praha – Beroun – Plzeň. En la rokoj, kiuj devis esti forigitaj, montriĝis prehistoria estinteco de la regiono, ĉar en paleozoiko tie ĉi disvastiĝis malprofunda maro. Ĉe la rekognizado (mapado) de la regiono malkovriĝis antaŭ la inĝeniero granda trovaĵejo de ŝtoniĝintaj fosilioj, precipe trilobuloj (trilobitoj).

Antaŭ sia foriro el Ĉeĥio (li mortis en Aŭstrio) li siajn riĉajn paleontologiajn kolektojn donacis al la ĉeĥa sciencularo, kaj tiu vidigis sian dankemon per la ora skribo sur la menciita roko.

Pri Joachim Barrande ni havas ankoraŭ jenan intiman rememoron: li loĝis en la domo „Ĉe tri oraj steloj“, kie la mastrumadon prizorgis Barbara Nerudová – la patrino de Jan Neruda. Barrande eklernis ĉeĥan lingvon, tial li povis tralegi la unuajn verkojn, kiujn al li proponis la fiera patrino de la poeto. Sed la atendita laŭdo ne alvenis. La pragmatika sciencisto esprimiĝis jene: „*Sciu – skribi poemojn estas nenio por vi... se vi volas vere esti al via popolo utila, forlasu la poezion kaj okupiĝu pri scienco...*“

Jan Neruda „la poezion ne forlasis“, kaj la motivo de olda sinjoro, kiu kolektas ŝtonojn, troviĝis en la aŭtora libro „Malostranské povídky“ (1876).

Aprilo 2022

Kompilis Margit Turková

JUBILEANTOJ DE APRILLO, MAJO KAJ JUNIO 2022

Jaroslav Benda, Most
Vladimír Forejt, Chomutov
Helena Hillebrandová, Rychnov u Jablonce
Zdenka Horáková, Slavičín
Josef Hosa, Havířov
Blanka Hužerová, Mladá Boleslav
Mgr. Jana Kaucová, Ostrožská Lhota
Mária Kráčmarová, Hořice v Podkrkonoší
Ing. Jaroslav Krolupper, CSc., Praha
Ivana Kubová, Dřevohostice
Miroslav Majerský, Nové Město nad Metují
Ing. Stanislav Nedělka, Hradec Králové
Milada Petráčková, Nevratice
Ing. Jaroslav Pokorný, Česká Rybná
Tomáš Polnický, Poděbrady
Ivan Potiška, Teplice nad Bečvou
Ing. Hana Rolencová, Třemošná u Plzně
Mgr. Jan Smejkal, Havířov
Ing. Radim Surý, Hnojník
Ing. Vladimír Šilhán, Praha
Josef Šimberský, Chleny
Václav Vanc, Ústí nad Labem
Jiří Vaníček, Chrudim

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras sanon, vivkomforton, plenumadon de iliaj deziroj!

Nova koalicio de simil-ideanoj

Fondiĝis fare de amerikaj universitatoj la asocio MONDA KOALICIO POR LINGVAJ RAJTOJ, al kiu rajtas aliĝi individuoj kaj asocioj, kiu devus esti io interesa por esperantistoj. Jen la priskribo de iliaj celoj:

NIA MISIO: LINGVAJ RAJTOJ POR ĈIUJ

"Eĉ se vi parolas superregan lingvon, vi tamen ricevas limigitan parton de la haveblaj informoj". Ni prenu Vikipedion kiel ekzemplon. Vi eble pensas, ke ekzistas en Vikipedio multaj universalaj temoj tra la malsamaj lingvoversioj. Fakte, ekzistas malpli da komuna enhavo tra la diversaj lingvoj: 74 elcentoj de la konceptoj havas artikolojn nur en unu lingvo, kaj 95 elcentoj de la konceptoj ekzistas en malpli ol ses lingvoj.

Se vi esploras, kiel la mondo aspektas, se vi parolas la hebrean aŭ la araban, tre malsama bildo aperas rilate al tio, kio estas priskribita en la angla. Estas grandaj informaj malplenoj en neregantaj lingvoj, kie homoj, lokoj kaj kulturoj malaperas en nigran truon. Kaj kiam vi rigardas al lokoj priskribitaj en Vikipedio en malgrandaj lingvoj, iĝas evidente ke la monda sudo malaperas. La temo pri reta lingva reprezentado iĝas problemo, nur se vi kapablas entute aliri la reton.

Kvankam en 2016 Unuiĝintaj Nacioj deklaris aliron al la Interreto baza homa rajto, miliardoj da homoj en la mondo plue estas senrajtaj aŭ pro siaj registaroj, kiuj malhelpas retan aliron, la manko de baza reta kunliga strukturo aŭ la manko de komputila kapablo. Ni kredas, ke je tiu ĉi interplektiĝo de retaj, homaj kaj lingvaj rajtoj ni kune povas defii la lingvan hegemonion de malmultaj regantaj lingvoj kaj pledi por rete akceli lingvaj rajtojn. Ĉiu individuo aŭ asocio rajtas aliĝi. La aliĝilo estas en la angla ĉe <https://www.coalitionforlanguage rights.org/join> Petu plurlingvigon!

Laŭ EKO 27

Ni kondolencas

Jaromíra Matýsková



La 26-an de marto mortis en Opava Jaromíra Matýsková, naskiĝinta 3. 10. 1934. Ŝi esperantiĝis en sesdekaj jaroj kaj la tutan vivon ŝi aktive partoprenis esperantistan vivon. Ŝi ĉeestis multajn esperantistajn renkontiĝojn, krom katolikaj ankaŭ kejkajn universalajn kongresojn, dum kiuj ŝi deĵoris kiel helpantino. Ŝi havis vastajn amikajn perleterajn kaj personajn kontaktojn. Profesie ŝi laboris kiel instruistino, pro sia kredemo ofte persekutata dum socialisma tempo. Krom al esperantumado ŝi dediĉis sin al turismo kaj socialaj aktivadoj.

■ La 19-an februaro 2022 forpasis s-ro **Stanislav Pech** el Plzeň (65-jara).

Universitataj studoj de Esperanto

Adam Mickiewicz Universitato en Poznano (Pollando) lanĉas dujarajn magistrajn studojn pri interlingvistiko kombinite kun informatikaj metodoj por lingvistoj (retejoj, korpuso, tradukiloj).

La semestra kotizo estas 3000 PLN (proksimume 650 eŭroj) kaj la vivkostoj en Pollando estas malpli altaj ol en okcident-eŭropaj landoj.

Pluaj informoj, studplano en la retejo de la Interlingvistikaj Studoj:

http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_apr22.html

Prelego pri la Interlingvistikaj Studoj dum la 9-a Irana Kongreso:

<https://www.youtube.com/watch?v=okbznkrwicw>, komenciĝas je la 3.00 horo, en la tria parto (3.25) okazas prezento de la magistraj studoj.

Ekzamenaj rezultoj el Togolando

La dua trimestro de la lernojaro 2021-2022 en la Instituto Zamenhof komenciĝis en januaro kaj finiĝis en aprilo 2022. Ĝi konsistis el 10 semajnoj, dum kiuj okazis kursoj kaj fine ankaŭ la ekzamenoj trimestrofinaj. Jen la rezultoj de tiuj ekzamenoj! Infanvartejo: 100% da sukceso. Elementa nivelo: El la kvin klasoj kun pli ol cent lernantoj, la sukcesoj estis 100%, 100%, 97.5%, 90.2%, 91.8% kaj 82.1%. Duagrada nivelo (Kolegio): La sukcesoj gamis inter 80 kaj 90%. En la lasta trimestro, la gelernantoj de la sesa klaso de la elementa nivelo kaj tiuj de la kvara klaso de duagrada nivelo trapasos ŝtatajn ekzamenojn. Apartaj preparlaboroj okazas por ili.

Arĥivo de EKO ĝisdatigita

Ni ĝoje anoncas, ke la arĥivo de EKO (Esperiga Komunikado) por 2022 estas ĝisdatigita ĝis inkluzive numero 25 de 2022. Trovu ilin en la retejo de UEA **aktivulo.net** ĉe la subtemo *Agadaj Raportoj*. Tie vi trovas la kolektojn ĉiujare kaj laŭjare de post 2013. La alfabeto indokso por 2022 estas pretigita jam same ĝis numero 25, kaj estas petebla de SMG (nepeza PDF, 4-paĝa). Jen trezoro por historiistoj, ĉar la komunikoj ĉiam emfazis la lokan, landan, fakan kaj regionan agadon. Lokoj, kiujn ne tiom atingas la aliaj! La indokso nepras por ebligi la rapidan trovon de difinitaj informoj.

laŭ EKO 28

En la Teatro Semafor denove sonis Esperanto



Ekde la forpaso de [Miroslav Smyčka](#) en 2017 okazis kelkaj renkontiĝoj de liaj esperantistaj geamikoj kun liaj familianoj. Post la lastjara paŭzo la tradicio povis esti renovigita la 12-an de majo 2022. Tiam en la plenokupita furora teatro Semafor en Prago-Dejvice okazis la entute unua komuna koncerto de la geedzoj baritonisto Richard Haan kaj kantistino kaj aktorino Jolana Haan Smyčková. Ĝui buntstile kunmetitan emociplenan programon venis ankaŭ 15 geesperantistoj.



Richard Haan ravis la publikon per samaj operarioj (ekz. de Toreadoro, Nikso aŭ Don Giovanni), Jolana temperamente prezentis klasikaĵojn de sia repertuaro kaj la geedzoj kantis unufoje publike kune i.a. muzikalajn kantojn. Krome ĉarme prezentiĝis iliaj filoj Ríša (9jara) kaj Kristiánek (6jara). La koncerto estis dediĉita ankaŭ al rememoro pri Miroslav Smyčka kaj lia filino kadre de ĝi kantis en Esperanto

konatan kanton "*Steloj, adiaŭ nun*".



Do jam la duan fojon (post la [kristnaska koncerto en 2017](#)) povis en la teatro soni Internacia Lingvo (ankaŭ dank al favoro de la direktoro Jiří Suchý, kiu siadire en la 70-aj jaroj kelkajn semajnojn iom lernis Esperanton). Jiří Suchý mem surprize aperis surpodie kaj fascine kantis kun Jolana fine de la koncerto.



Kelkajn videospecimenojn vi povas spekti en [Jutubo](#) klakinte [ĈI-TIE](#)

Pro granda sukceso la koncerto okazos en la teatro denove la 3-an de novembro 2022. Favorprezajn biletojn eblos aĉeti rete en www.semafor.cz. Do ĝis la revido!
Pavla Dvořáková

P.S. Koincide Semafor naskiĝis en 1959 en la str. Ve Smečkách 26 en Prago 1, precize kie en 1954-1959 funkciis Praga E-Klubo kaj teatra grupo "Verda Ĉaro de Julio Baghy" de geedzoj Seemann.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Časopisy a knihy na internetu

Časopisy a knihy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitgazetoj.html>

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitlibroj.html>

Internetový kurz esperanta, třeba pro ty, kteří si chtějí oprášit své znalosti

<https://lernu.net/cs>

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
53. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117**

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2022

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 53-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.8.2022**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan mardon virtualaj kunvenoj de E-
Klubo en Brno - gastoj bonvenas!
Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>
info: brno@esperanto.cz

2022-06-09 30 jaroj de KAVA-PECH, JTP
Senovážné nám. 23, info: chrdle@kava-pech.cz

2022-07-17/30 Unua etapo de SET Lančov
2022-07-31/-08-12 Dua etapo de SET Lančov
2022-08-12/14 Renkontiĝo de ekstendaranoj
info: let.lancov@seznam.cz

2022-09-16/18 ĈEA-kongreso en Pardubice

2022-10-07 150 jaroj de F.V. Lorenc en Vrды

2022-10-07/09 Fervojistoj en Prudká

2022-10-21/24 Renkontiĝo en Svitavy kaj
Inaŭguro de ekspozicio pri fakaj asocioj de
UEA kaj pri Lorenz

2022-11-12/13 120 jaroj EK Praha

2022-11-17 kaj 22 KER-ekzameno Bartošovice

2022-12-04 Marcipana Kristnasko

2022-08-06/13 Universala Kongreso en
Montrealo



2022-10-13/16 KAEST

2023

2023-09-15/17 ĈEA-konferenco en Strážnice



S-ro Vladislav Vokoun ektranĉas torton kun emblemo de IFEF (en Beroun)



Parto de IFEF-kongresanoj vizitis Pragon



Svitavanoj en Lipnice nad Sázavou



Dum la IFEF-kongreso Petr Chrdle, Jaroslava Malá kaj Miroslav Malovec finis redaktadon de nova Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro, kiu povis iri al la presejo kaj estos solene prezentita jaŭde la 9-an de junio 2022 okaze de la 30-jariĝo de la eldonejo KAVA-PECH.



Renkontiĝo en Šumperk antaŭ la muzeo de sorĉistaj procesoj